

Esperanto kaj universitato. Simpozio en Lisbono, 4-5 aŭgusto 2018

La venontajn 4-an kaj 5-an de aŭgusto en Lisbono okazos nova Nitobe-simpozio kun la temo “instruado kaj esplorado pri Esperanto en (soci/inter) lingvistiko kaj en sociaj sciencoj”.

Aŭspiciantoj

La konferenco estas aranĝo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi estas subvenciata de Esperantic Studies Foundation (ESF). Danke al tio ne estas kotizo. ESF ankaŭ prizorgos kafo-pauzojn kaj komunan manĝon. La simpozio okazas ĉe la Universitato de Lisbono.

Loko

Oni antaŭvidas, ke la simpozio okazos en la konstruaĵo Reitoria da Universidade de Lisboa, Alameda da Universidade, 1649-004 Lisbono, Portugalio.

Datoj

La simpozio komenciĝos en la frua posttagmezo de sabato la 4-a aŭgusto kaj finiĝos ĉirkaŭ la 19-a horo dimanĉon la 5-an de aŭgusto.

Historio

Omaĝe al la fama japana diplomato Nitobe Inazo, kiu en 1921 ĉeestis la UK en Prago kiel vica ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj kaj favore raportis pri la rolo de Esperanto en la internaciaj lingvaj problemoj de komunikado, la unuan Nitobe-simpozion de internaciaj organizaĵoj pri lingvo por internaciaj paco kaj demokratio organizis UEA paralele kun la 81a UK en Prago en 1996.

Ekde tiam okazis similaj lingvo-politikaj simpozioj lige kun la tiujara UK en 1999 en Berlino pri *tutmondiĝo kaj lingva diverseco*, en 2004 en Pekino pri *nova internacia lingva ordo*, en 2005 en Vilno pri *lingvopolitikaj aspektoj de la larĝiĝo de la Eŭropa Unio*, en 2007 en Tokio pri *europaj lingvoj kaj aziaj nacioj*, kaj en 2013 en Rejkjaviko pri *anglalingva instruado en neanglalingvaj universitatoj*.

Temo de ĉi-jara Nitobe-simpozio

En 2018 lige kun la ĉi-jara UK en Lisbono la temo estos la rolo de Esperanto kaj interlingvistiko (Ekl) en la instruado kaj esplorado de lingvistiko kaj la sociaj sciencoj ĝenerale – kaj inverse (do, la rolo de lingvistiko kaj la sociaj sciencoj en la universitata instruado kaj esplorado de Esperanto kaj interlingvistiko).

Celoj kaj rezultoj

La unua kaj ĉefa celo estos arigi universitatanojn kiuj aŭ jam okupiĝas pri Ekl aŭ interesiĝas pri la temo en la kunteksto de sia propra instruado de (soci)lingvistiko, lingvopolitiko, sociaj sciencoj k.s. Dua celo estos trakti kun instruantoj kaj esplorantoj de Ekl pri komuna agado en la estonteco por plifortigi kaj plielstarigi tiun fakon. Tiusence, en la kadro de la simpozio Angela Tellier (Universitato de Liverpolo) estos prezentata kiel nova ESF-internacia kunordiganto de universitataj kontakoj kaj samtempe CED-kunordiganto.

Strukturo

Temos pri labora konferenco, kun celo forigi la izolitecon inter la diversaj universitatoj kaj starigi kunlaboron; sekve la nombro de formalaj referaĵoj estos minimuma kaj post ĉiu el ili okazos vigla interdiskuto inter la partoprenantoj. Aliflanke ESF komisiis al Juan Diego Díaz Bautista pretigi raporton pri la nuna stato de instruado kaj esplorado pri Ekl en universitatoj tutmonde, kiu estos prezentata dum la simpozio, kaj kiu inkludos unuan analizon pri la bezonoj kaj deziroj de la homoj kiuj okupiĝas pri Esperanto en la universitato.

Lingvoj

Esperanto kaj la angla estas oficialaj laborlingvoj, kun eventuala rolo ankaŭ de la hispana kaj/aŭ de la portugala.

Ĉefprelegontoj

Por enkonduki la temojn, du fakuloj ĉefprelegos en la simpozio. Unuflanke, Sabine Fiedler (Universitato de Leipzig) donos superrigardon pri la nuna stato de studoj kaj esploroj en Ekl, inkluzive de fortoj kaj malfortoj (kampoj bone reprezentataj kaj kampoj kie estas nepre bezonata plia esplorado). Alivorte, Esperanto en (soci/inter) lingvistiko. Aliflanke, Roberto Garvía (Universitato Carlos III de Madrido) prelegos pri enmeto de Esperanto-rilataj elementoj en pli vastaj sociaj sciencaj kursoj, kaj pri la tuta esplorkampo de la frua historio de la Esperanto movado. Alivorte, pri Esperanto en sociaj sciencoj.

Aldone, Duncan Charters prezentos la multjaran spertojn de ILEI en tiu fako, inkluzive de la rezultoj de la ILEI konferenco okazonta en julio 2018 en Madrido, Hispanio. Fine, Vicente Manzano-Arrondo (Universitato de Sevilo) prezentos la unuajn rezultojn de nova esploro pri la percepto de la disvastigo de la angla lingvo en pluraj Eŭropaj landoj, kiuj plurmaniere rilatas al la temo de la simpozio.

Invitoj

La konferenco estas nur por invitoj. Por peti inviton, turnu vin al Javier Alcalde ĉe la ĉi-suba retadreso.

alcalde.javier@gmail.com

Unua Bulteno, 7 majo 2018